Spinozo: Mi estas Ŝarli'

Robert Molimard

(Retmetita artikolo kun permeso de La Sago (2015)n°105, Jan/feb, p 6)



La fanatikaj murdistoj kriis: *"Ni murdis Ŝarlion"*. Tiel ili signis ilian celon, silentigi liberan parolon, kiu povus subfosi la superregadon de ideologioj, ĉefe religioj, super popoloj. Klare, ilia ĉefa celo estis ateismo. Kiam *Kenedi'* diris': *"Ich bin ein Berliner"*, aŭ tiuj, kiuj manifestis per *"Ni ĉiuj estas germanaj judoj"*, protestante kontraŭ la elpelo de *Kon-Bendito* el Francujo, tiaj esprimoj signifas ilian empation. Same, la afiŝoj *"Mi estas Ŝarli'"* signifas ambaŭ kompaton al viktimoj kaj akordo pri esprimlibero, eĉ se foje ĝi agresas ies ajn konvinkojn. Ĉar se muzulmanoj, kristanoj, judoj, policanoj, politikistoj vidas siajn fiagojn, siajn provokajn parolojn aŭ vestaĵojn mokitajn kaj malkaŝitajn de *Charlie-Hebdo*, ĉiuj povas akordiĝi kun ĝia batalo por ke la societo estus laika, tolerema, kaj tute kontraŭ rasismo kaj malhumanaj ideologioj. Klare, "*Mi estas Ŝarli'* " estas kredkonfeso kontraŭ krimbruligantoj de moskeoj kaj sinagogoj, sakrileguloj de tombejoj kaj atakantoj de personoj, ĉio, kion ateistoj ne kutime plenumas.

La ideo de Dio estas tutmonda. Nature, kiam homo vidas eventon, kies li ne komprenas kialon, li imagas ke agas iu ajn nevidebla ulo, kiun li nomas dio. Bona dio fluigas fontojn, malbona blovas ŝtormojn. Kultoj formiĝis por akiri favorojn kaj preventi malbonaĵon. Tiel aperis idoloj, temploj, preĝoj, kiuj difinas religion, fetiĉistan, poli- aŭ monoteistan.

Plie, homo estas fragila, atakebla, do necese socia animalo. Por vivadi en malamika naturo, praaj hordoj bezonas kunordigi siajn agadojn, do havi ĉefon kaj konstrui hierarkon. Sed estro estas homo. Li iĝas multe pli potenca se sia grupo povas diri ke li estas elektita de dioj, kiuj gvidas liajn agadojn. Nature monoteismo estas multe pli efika. Decidocentroj estas ***translokigitaj, malmateriigitaj*** al ununura anonima ĉiopova supernatura ekstratera *holdingo.* Sed fakte la povo estas plenumita de teraj ***filioj***, kies konkurencaj interesoj kaŭzas tiom da kruelegaj militoj. Klare, religioj ĉiam konstituas forton de tute tempaj povoj, apogitaj sur arkaikaj pensoj, el kiuj homaro ne sukcesas foriĝi.

La Biblio diras ke Dio kreis mondon por homoj. Tiel ili rajtas libere ĝui kreskaĵojn, bestojn, ĉiujn riĉaĵojn de naturo. Tial, malakcepti tian donacon kaj rifuzi tute ĝui ĝin estus ofendo, blasfemo. Same kiel infano sian ludilon, homo do rajtas detrui naturon, dolorigi kaj murdi bestojn, eĉ aliajn homojn, post kiam li decidas ke ili estas bestoj, aŭ ne veraj homoj pro tio ke la Dio de tiuj miskreduloj ne estas la nura vera Dio de lia tera filio.

Tia ideo de dio kaŭzas tiom da malbonaĵoj ke ateismo devige estus loginta popolojn. Sed ĝi ne vere sukcesas, pro tio ke bezono de dio estas tiel forta kaj ĝenerala en mensoj. Plie, ĝi ne proponas iun ajn kialon al la vivo. Sen dio, la ĉielo estas vakua, sen spirito. Kien irus animojn de mortintaj korpoj por unuiĝi kun Universa Ĉiela Spirito?

En la 1676-a jaro estis publikigita libron de Spinozo. Li simple kiel diris: *"Vi serĉas viajn okulvitrojn, dum ili estas sur via nazo !"*. Laŭ li, nur ekzistas tio, kion ni vidas, sentas aŭskultas, tuŝas, t.e. la naturo. Sed la naturo, pri kiu li parolas, enhavas ne nur ĉiujn materiojn, sed ankaŭ ĉiujn spiritojn, vian, bestiajn, insektajn ktp., kiuj spontane aperis en ĝi. Nenio ekzistas ekster la universo. Materio kaj spirito, korpo kaj animo ne estas disigeblaj. Naturo estas ununura, eterna, ĉiopova, ĉieesta. Li aŭdacis nomi ĝin dio. Ni estas portempa parto de ĝi, ni estas portempa avataro de la dio de Spinozo.

Konsekvencoj de tia vidpunkto estas egegaj. Ĉiu homo scias ke naturo ekzistas. Ĝiaj leĝoj estas universaj. Naturo petas nek kulton, nek kirkojn aŭ preĝajn procesiojn por petegi bonan rikoltaĵon, nur inteligentan respekton de ĝi kaj komprenon de reguloj, per kiuj ĝi funkcias. Ju pli oni konas ĝin, despli oni profitas de ĝi. Tio instigas al scienca esploro. Alberto Ejnŝtejno diris: *"Mi kredas je la Dio de Spinozo, kiu aperas en la harmonia ordo de ĉio, kio ekzistas, kaj ne je dio, kiu zorgas pri destino kaj agadoj de homoj"* [1]. Aŭ ankaŭ: *"Se ekzistas en mi ion ajn, kion oni povas nomi religia, tiam estus mia senlima admiro pri strukturoj de la universo, laŭ tio, kion nia scienco kapablas revelacii."*

Ne ekzistas supernatura moralo. Diaj rekompensoj aŭ punoj ekzistas nek sur la tero, nek iam en ĉielo aŭ inferno. Dio de Spinozo estas bona aŭ malbona nur en la spirito de homoj. Tial homaro estas tute responsa de sia kondutaj reguloj. Naturo ne elektas iun ajn homan grupon kiel preferato. Kono de aliaj homoj kiel parto de dio estas pero de reciproka kompreno, kiu eblus kunlaboron kaj evitus konfliktojn.

Jes, Spinozo estus dironta: "*Mi estas Ŝarli'* ". Li antaŭvidis kiel funkcias murdistoj, skribinta: " *Same, infanoj aŭ adoleskuloj, kiuj ne povas elporti egalanime riproĉojn de siaj gepatroj, rifuĝas en la militan vivon, elektas malbonaĵojn de milito kaj despotismon de tirano prefere al avantaĝoj de hejmo kaj patraj admonoj, kaj obeeme suferas iun ajn ŝarĝon, kondiĉe ke ili venĝas al siaj gepatroj"*.[2]

Humaneco de Spinozo kuniĝas kun tiu de Zamenhofo. Li ne verkis nederlandlingve, sed latinlingve, pro tio ke latino estas la internacia lingvo tiutempe. Certe, li nun estus verkanta en esperanto.

1.- Telegramo al Nov-Jorka rabeno Goldŝtejno, aprilo 1929)
2.- Spinoza, Etico, parto 4, ĉapitro XIII